ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 10-12-2019

Oktobro-Decembro 2019

JARKOLEKTO 116 - N. 1179-1181 - Oktobro/Decembro 2019

*Sur la kovrilo:* Papo Francisko simbole plantas arbon baobabon en Madagaskaro

## ENHAVO

APOSTOLA VOJAĜO DE LA PAPO FRANCISKO AL MOZAMBIKO, MADAGASKARO KAJ MAŬRICIO (papo Francisko) 51

EMOCIE NI ATENDAS FINAN RENKONTON KUN DIO (papo Francisko) 53

LA EKLEZIO ESTAS DIA ANKAŬ HODIAŬ (Benedikto la 16-a) 54

Kardinalo Sarah: EN KERNO DE KRIZOJ DE LA OKCIDENTA SOCIO ESTAS FLUECA ATEISMO 56

Kardinalo Ouellet: EŬROPO, KIO OKAZAS AL VI? 58

LAŬ LA SPUROJ DE LA PAPO MONTINI – LA PAPO PAŬLO LA SESA 59

LA PREĜO AL SANKTA PAŬLO LA SESA 59

VAŜINGTONO, USONO – La Usona Konferenco de la Katolikaj Episkopoj traktis la temon de pornografio en Baltimore 61

LA FUNDAMENTAJ VEROJ 63

SANKTA NOKT´, SILENTA NOKT´ (kanto) 64

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# APOSTOLA VOJAĜO DE LA PAPO FRANCISKO AL MOZAMBIKO, MADAGASKARO KAJ MAŬRICIO

***Katekizado de la papo Francisko el la 10-a de septembro 2019 sur la Placo de la Sankta Petro (Mat 13, 31-33)***

Karaj gefratoj, bonan tagon!

Hieraŭ mi revenis el la apostola vojaĝo al Mozambiko, Madagaskaro kaj Maŭricio. Mi dankas al Dio, kiu al mi ebligis realigi tiun ĉi pilgrimon de la paco kaj espero, kaj denove mi esprimas dankemon al reprezentantoj de la unuopaj ŝtatoj, kiel ankaŭ al episkoparoj, kiuj min tiel kore invitis kaj zorgeme akceptis, kaj ankaŭ al la apostolaj nuncioj, kiuj tiun ĉi vojaĝon preparis.



*La papo Francisko en Mozambiko*

Espero de la mondo estas Kristo, kaj lia evangelio estas la plej potenca fermentaĵo de la frateco, libereco, justeco kaj paco por ĉiuj nacioj. Per mia vizito laŭ spuroj de la sanktaj evangeliistoj, mi strebis tiun ĉi evangelion de Jesuo alporti al mozambika, malgaŝa kaj maŭricia popolacioj.

En Mozambiko mi la semon de la espero, paco kaj repaciĝo semis en grundon, kiu en pasinteco multe suferis kaŭze de longedaŭra arma konflikto kaj nunjare printempe ĝi estis trafita per du ciklonoj, kiuj kaŭzis grandegajn damaĝojn. La eklezio plu akompanas pacan proceson, kiu nunjare je la 1-a de aŭgusto progresis per packontrakto inter ambaŭ flankoj. Ĉi tie mi volonte haltas por danki al Komunumo Sant´Egidio, kiu multe pledis pri tiu ĉi packontrakto.

En tiu ĉi spirito mi kuraĝigis ŝtatajn reprezentantojn por komuna laboro prospere al ĝenerala bono. Kaj mi instigis gejunulojn apartenantajn al diversaj religioj, por ke ili konstruu sian patrujon per supero de rezignacio kaj senpacienco, per kultivado de sociala afableco kaj respekto rilate al tradicioj de pli maljunaj. Al episkopoj, sacerdotoj kaj konsekritaj personoj, kun kiuj mi renkontiĝis en la katedralo de Maputo, konsekrita al la Senmakula Koncipiĝo, mi proponis ŝian nazaretan vojon de la grandanima jesado al Dio en dankema rememorado pri Lia alvokiĝo kaj propra deveno. Forta evangelia signo estas Hospitalo en Zimpeto, en periferio de la ĉefurbo, kiu estis konstruita klopode de la Komunumo Sant´Egidio. En tiu ĉi hospitalo mi vidis, kiel malsanuloj estas tiuj la plej gravaj. Pri ili insertis ĉiuj. Ne ĉiu el ili estas de la sama religio. Direktorino de la hospitalo estas eminenta virino, scienca laborulino kaj mahometanino. Ĉiuj tie kune laboras por popolo, en unueco kiel fratoj. Mia vizito de Mozambiko kulminis per la sankta meso sur stadiono. Pluvis, sed ĉiuj ni estis feliĉaj. Kantoj, spiritaj dancoj, feliĉo.



*La papo Francisko en Madagaskaro*

La pluvo ne ĝenis. Eksonis ĉi tie alvoko de la Sinjoro Jesuo: »Amu viajn malamikojn« (Luk 6,27), la semado de la vera revolucio

– de la amo, kiu mildigas perforton kaj naskas fratecon.

El Maputo mi transiĝis al Antananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro. Ĝi estas lando riĉa je naturbelaĵoj kaj fontoj, sed signita per granda malriĉeco. Mi esprimis esperon, ke la malgaŝa popolo, animigita per sia tradicia solidareco, sukcesos superi suferojn kaj atingos estontan disvolvon kunigantan respekton al vivmedio kaj sociala justeco. Kiel profetan signon de tiu ĉi direktigo mi vizitis Urbon de Amikeco – Akamasoa, fonditan fare de misiisto – lazarano, patro Pedro Opeka. Ĉi tie oni strebas pri kunigo de laboro, digneco, zorgo pri la plej malriĉaj kaj pri edukado de infanoj. Ĉion tie vivigas evangelio. En Akamasoa apud granita ŝtonminejo mi deklaris preĝon al Dio por laboruloj.

Plue en la karmelitana monaĥinejo mi renkontiĝis kun kontemplemaj fratulinoj de diversaj ordenoj. Sen la kredo kaj la preĝo ne eblas krei homindan kunecon. Kune kun episkopoj de tiu ĉi lando ni refreŝigis devoligon „dissemadi pacon kaj esperon“, zorgadi pri la Dia popolo, precipe pri malriĉuloj kaj niaj sacerdotoj. Kune ni honorigis beatulinon Victoire Rasoamanarivo, la unuan malgaŝan virinon altigitan al altarhonorado. Kune kun junaj, kiuj multnombre ĉeestis la vigilion, mi travivis vesperon riĉan je atestadoj, kantado kaj danco.

En Antananarivo estis solenata dimanĉa Eŭkaristio sur granda dioceza terspaco, kie ĉirkaŭ la Sinjoro Jesuo kolektiĝis grandaj homamasoj. Kaj fine mi en instituto Saint-Michel renkontiĝis kun sacerdotoj, konsekritaj personoj kaj seminarianoj de Madagaskaro. La renkontiĝo okazis en signo de la gloro honordonata al Dio.

Lundo estis dediĉita al vizito de Maŭricia Respubliko, la konata turisma celo, kiun mi do elektis kiel lokon integrantan diversajn etnojn kaj ilian kulturon. Dum lastaj du jarcentoj transloĝiĝis al tiu ĉi insulo multaj homoj, precipe el Hindujo kaj post akiro de sendependeco la insulo trairis la gravan ekonomian kaj socialan prosperon. Okazas tie forta interreligia dialogo kaj ankaŭ amikeco inter reprezentantoj de la apartaj religiaj konfesioj. Al ni tio povus ŝajni nenormala, sed tie vivata amikeco estas tute natura. Kiam mi venis al episkopejo mi tie trovis belegan florbukedon de la tiea supera imamo kiel signon de la frateco.



*La papo Francisko en Maŭricio*

La sankta meso en Maŭricio estis celebrita ĉe memoriga monumento de la Virgulino Maria, la Reĝino de la Paco, omaĝe al beatulo Jacques-Désiré Laval, nomata „apostolo de Maŭricio“. La evangelion pri la beatecoj, kiuj estas identigiloj de la disĉiploj de Kristo, estas en tiu ĉi teksto kontraŭmedikamento kontraŭ tento de egoisteca kaj diskriminacia bonfarto kaj ankaŭ fermentaĵo de la vera feliĉo, trapenetrita per mizerikordo, justeco kaj paco. Mi estis informita, kion la episkopoj faras por evangelizado de malriĉuloj. Dum la renkontiĝo kun reprezentantoj de Maŭricio mi aprezis strebon kunordigi diversecojn per komuna projekto, kuraĝigante ilin al plua disvolvo de tiu ĉi gastamemo, kiel ankaŭ al konservado kaj evoluado de la demokratia vivo.

Hieraŭ antaŭvespere mi revenis Vatikanon. Dumvoje hejmen mi ĉiam haltas ĉe *Madono Salus populi romani*, kiu min akompanas dum la vojaĝoj kiel Patrino, ŝi diras al mi, kion fari, kaj gardas miajn vortojn kaj gestojn. Kun Madono mi iras sekure.

Karaj gefratoj, ni danku Dion petante Lin, ke la semado de tiu ĉi apostola vojaĝo alportu abundan rikolton al la nacioj de Mozambiko, Madagaskaro kaj Maŭricio. ■

# EMOCIE NI ATENDAS FINAN RENKONTON KUN DIO

## Homilio de la Sankta Patro Francisko dum rekviemo por la mortintaj kardinaloj kaj episkopoj la 3-an de novembro 2017 en la baziliko de la Sankta Petro en Romo

La hodiaŭa liturgia celebro denove starigas antaŭ niajn okulojn morton kaj denove en ni vivigas ĉagrenon pro nia disigo kun homoj, kiuj estis al ni proksimaj kaj kaŭzadis al ni bonon. Sed antaŭ ĉio la liturgio en ni naskas esperon, kiun ni tenas por ili kaj por ni mem.

La unua legaĵo esprimas fortan esperon pri la releviĝo de la justuloj: "Multaj el tiuj, kiuj dormas en la tero, vekiĝos, unuj por vivo eterna, aliaj por eterna malhonoro kaj honto." (Dan 12,2) Tiuj, kiuj dormas en polvo de la tero, do en grundo, kompreneble estas mortaj, kaj la vekiĝo el la morto kompreneble ne estas mem el si reveno al la vivo – iuj do vekiĝos al la eterna vivo, aliaj al la eterna honto. La morto kun fina valideco konfirmas disvojiĝon, antaŭ kiu ni staras jam en tiu ĉi mondo kaj kiu kondukas al la vojo de la vivo, do al la kuneco kun Dio, aŭ al la vojo de morto, do malproksimen de Dio. "Multajn", kiuj vekiĝos al la eterna vivo, estas necese kompreni kiel "multajn", pro kiuj estis elverŝita sango de Kristo. Tiu multo povas danke al la mizerikorda boneco de Dio ĝui realecon de la nemortema vivo, la totalan venkon super la morto pere de la resurekto.

En la evangelio Jesuo fortigas nian esperon per la vortoj: "Mi estas la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo. Se iu manĝos el ĉi tiu pano, tiu vivos eterne." (Joh 6,51) Tiuj ĉi vortoj referencas al la ofero de Jesuo sur la kruco. Jesuo akceptis morton, por savi homojn, kiujn al Li donis la Patro kaj kiuj mortis en sklaveco de la peko. Jesuo iĝis nia frato kaj partoprenis en nia situacio ĝis la morto – per sia amo Li rompis jugon de la morto kaj malfermis al ni pordegon de la vivo. Kiam ni satiĝas per lia Korpo kaj Sango, ni kunigas nin kun lia fidela amo, kiu en si portas esperon pri la fina venko de la bono super la malbono, per sufero kaj morto. El potenco de tiu ĉi Dia ligilo de la mizerikorda amo de Kristo ni scias, ke la kuneco kun la mortintoj ne estas nura deziro aŭ imago, sed realeco.



La kredo je la reviviĝo, kiun ni konfesas, nin gvidas al tio, ke ni estas homoj de la espero, kaj ne de la malespero, la homoj de la vivo, kaj ne de la morto, ĉar nin konsolas promeso de la eterna vivo ankrita en la kuneco kun la resurektinta Kristo.

Tiu ĉi espero, kiun en ni denove flamigis la vorto de Dio, al ni helpas, ke ni vidal-vide la morton ekokupu staton de la fido. Jesuo do al ni montris, ke la lastan vorton ne havas morto, sed la mizerikorda amo de la Patro, kiu nin transformas kaj ebligas al ni travivadi la eternan kunecon kun Dio. La baza trajto de la kristano estas la sento pri la emocia renkonto kun Dio. Antaŭ la momento ni tion denove konfirmis legante la psalmon: "Mia animo soifas Dion, la vivantan Dion.



Kiam mi venos kaj aperos antaŭ la vizaĝo de Dio?” (Psa 42,3) Tio estas poeziaj vortoj, kiuj kortuŝe esprimas nian viglan atendadon, soifantan pri la Dia amo, beleco, feliĉo kaj la saĝo.

La vortoj de tiu ĉi psalmo ankaŭ enpremiĝis en la animojn de niaj fratoj kardinaloj kaj episkopoj, kiujn ni hodiaŭ ekmemoras – ili forlasis nin post la servo al la eklezio kaj la konfidita al ili popolo, kaj tion en la perspektivo de la eterneco. Se ni do esprimas dankon pro la servo, kiun ili grandanime pruvis al la evangelio kaj la eklezio, kvazaŭ ni aŭdus, kiel ili kun la apostolo ripetiĝus: “La espero ne trompas.” (Rom 5,5) Jes, ne trompas! Dio estas fidela kaj la espero, kiun ni al Li konfidas, ne trompas. Ni do por ili elpetadu patrinecan propeton de la Plejsankta Virgulino Maria, por ke ili estu partoprenantoj de la eterna festeno, kiun ili en la amo kaj la kredo ankaŭ spertis dum la surtera pilgrimado. ■

*Radio Vatikana*

## LA EKLEZIO ESTAS DIA ANKAŬ HODIAŬ
### Benedikto la Dek Sesa



En memoro restadas vortoj, per kiuj jam preskaŭ antaŭ cent jaroj esprimis Romano Guardini ĝojan esperon, kiuj veriĝis ĉe li kaj ĉe multaj aliaj: „Komenciĝas evento de nemezurebla signifo: La eklezio vekiĝas en la animoj.“ Per tio li opiniis, ke la eklezio ne plu estas tia, kia ĝi estis iam, do nura aparato, kiu prezentiĝas eksteren kaj estas perceptata kaj spertata kiel certa speco de ofico, sed ĝi vekiĝas de interne, en la koroj mem, sed ne kiel io ekstera, sed tuŝanta interne. Ĉirkaŭ duonjarcenton pli poste, kiam li denove meditis pri tiu ĉi movado, li estis ĉe rigardo al tio, kio okazadis, tentata tiun ĉi frazon inversii kaj diri: „La eklezio en la animoj estas mortanta.“ Hodiaŭ la eklezio estas fakte opiniata nur kiel certa speco de la politika aparato. Oni do pri ĝi parolas nur helpe de politikaj kategorioj, kio ja eĉ validas por episkopoj, kiuj formulas sian koncepton de la estonta eklezio grandparte preskaŭ nur per politikaj terminoj. La krizo kaŭzita per multaj okazoj de misuzoj, deliktitaj fare de sacerdotoj, entrudigas opinion, ke la eklezio estas eĉ io malsukcesinta, kion ni devas mem ekpreni kaj denove krei. Sed la eklezio per ni kreita povas prezenti neniun esperon.

Jesuo mem komparis eklezion al fiŝkaptista reto, en kiu estas fiŝoj bonaj kaj malbonaj, kaj estas tasko de Dio fine apartigi unuj de aliaj. Plue estas ĉi tie parabolo pri la eklezio kiel pri la kampo, sur kiu kreskas tritiko, kiun semis Dio, sed ankaŭ lolo, kiun kaŝe semis „malamiko“ inter la tritikon. La lolo sur la Dia kampo vere frapas okulojn per sia multo kaj ankaŭ malbonaj fiŝoj en la reto montras sian forton. Sed spite de tio la kampo plu restas la kampo de Dio kaj la fiŝkaptista reto plu restas la reto de la Dia fiŝkaptado. Kaj en ĉiu tempo ekzistos ne nur lolo kaj malbonaj fiŝoj, sed ankaŭ la Dia semaĵo kaj bonaj fiŝoj. Anoncadi forte kaj per la sama mezuro ambaŭ ne estas falsa apologetiko, sed necesega servo al la vero.

En tiu ĉi sfero estas necese referenci al grava teksto en la Apokalipso. La diablo estas tie nomata kiel akuzanto, kiu akuzas niajn fratojn antaŭ Dio tage nokte (Apo 12,10). La Apokalipso tiel transprenas ideon, kiu estas centro de la evento, kiu kadrigas libron de Ijob

(Ijo 1,2; 42,7-16). Oni tie rakontas, kiel diablo strebas diskreditigi honestecon kaj diotimecon de Ijob nur kiel ion eksteran kaj suprajan. Ĝuste pri tio parolas Apokalipso: la diablo volas pruvi, ke ne ekzistas diotimecaj homoj kaj ke ĉiu diotimeco estas nur la eksteraĵo. Kaj se estus eble ilin submeti al provoj, baldaŭ malaperus la ŝajno de la diotimeco. La evento komencas per disputo inter Dio kaj diablo, dume Dio prezentas Ijobon kiel diotimeman viron. Tial okazos provo, por esplori, kiu havas veron. „Etendu vian manon kaj ektuŝu ĉion, kion li havas" – argumentas diablo – „kaj Vi vidos, ĉu li ne blasfemos Vin antaŭ Via vizaĝo". Dio allasis tiun ĉi provon, en kiu Ijob sukcesis. Sed diablo plu daŭras kaj diras: „Haŭto pro haŭto! Kaj ĉion, kion homo posedas, li fordonos por sia vivo! Sed etendu vian manon, kaj tuŝu liajn ostojn kaj lian karnon, tiam Vi vidos, ke li blasfemos Vin antaŭ via vizaĝo!" (Ijo 2,4). Dio donis al la diablo duan eblon. Li permesas, ke li etendu sian manon kontraŭ Ijob. Nur li ne rajtas lin mortigi. Por kristanoj estas klare, ke Ijob, kiu por la tuta homaro ekzemplodone staris antaŭ Dio, estas Jesuo Kristo. En Apokalipso estas dramo de la homo prezentita en la tuta sia larĝo. Kontraŭ Dio la Savinto sin stariĝas diablo, kiu diskreditas tutan kreitaĵaron kaj tutan homaron. Li sin turnas ne nur al Dio, sed antaŭ ĉio al homoj per vortoj: „Rigardu, kion faris tiu Dio. La kreitaro estas ŝajne bona. Sed fakte en sia tuteco ĝi estas plena de mizereco kaj abomeno. „ Nigrigi la kreitaron verdire signifas nigrigi Dion. Diablo volas pruvi, ke Dio mem ne estas bona, kaj li volas nin disigi de Dio. La aktualeco de tio, kion diras la libro de Apokalipso, estas evidenta. La akuzo direktita kontraŭ Dio hodiaŭ antaŭ ĉio koncentriĝas je akuzo de lia eklezio kiel tuto.Tiel ĝi volas nin de ĝi apartigi. La ideo pri iu pli bona eklezio, kiun ni mem kreos, estas fakte diabla propono, per kiu li volas nin disigi de la viva Dio kaj li por tio uzas mensogan logikon, en kiun ni tro facile enfalas. Ne, ankaŭ la eklezio hodiaŭ ne



estas kreata nur el malbonaj fiŝoj kaj lolo. La eklezio estas Dia ankaŭ hodiaŭ, kaj ĝuste hodiaŭ ĝi estas ilo, per kiu nin savas Dio. Estas tre necese kontraŭ mensogoj kaj duonveroj de diablo starigi la tutan veron. Jes, la peko kaj malbono en la eklezio ekzistas. Sed ankaŭ hodiaŭ la eklezio estas sankta kaj nedetruebla. Ankaŭ hodiaŭ ekzistas multaj homoj, kiuj humile kredas, suferas kaj amas kaj en kiuj sin montras al ni vera Dio – la Dio, kiu amas. Ankaŭ hodiaŭ havas Dio en la mondo siajn atestantojn (martirojn). Nur estas necese vigli por ilin vidi kaj ilin aŭskulti.


La nocio atestanto (martiro) estas prenita el procesa juro. En proceso kontraŭ diablo estas Jesuo Kristo la unua kaj aŭtentika atestanto de Dio, la unua martiro, kiun poste multaj sekvis. La eklezio estas hodiaŭ kiel neniam la eklezio de la martiroj kaj per tio atestanto de la viva Dio. Se ni rigardas ĉirkaŭe per singarda koro kaj ni aŭskultas, ni povas ĉie inter simplaj homoj, sed ankaŭ en alta eklezia hierarkio trovi atestantojn, kiuj per sia vivo kaj per sia suferado atestas pri Dio. Mallaborema koro ilin ne volas rimarki. Inter la grandajn kaj bazajn taskojn de nia anoncado apartenas en limoj de niaj eblecoj kreado de la vivspacoj de la kredo kaj precipe de ilia trovado kaj agnoskado. ■

*Fragmento el la teksto de Benedikto la Dek Sesa el la 11.4.2019 „La eklezio kaj skandalo de misuzadoj".*

# Kardinalo Sarah: EN KERNO DE KRIZOJ DE LA OKCIDENTA SOCIO ESTAS FLUECA ATEISMO

Pri la krizo de la okcidenta socio rifuzanta heredon de sia civilizacio, vokado pri profunda interna renoviĝo de la servantoj de la eklezio, pozitivaj kaj negativaj flankoj de la liturgia reformo, sed ankaŭ la aktualaj demandoj kunigitaj al sinodo pri Amazonio, pri tio ĉio parolas kardinalo Sarah en abunda interparolo por *National Catholic Register*.

La prefekto por liturgio kaj sakramentoj serĉas neniujn substituajn kulpulojn. Degeneron de la kristanismo en Okcidento kaŭzas mem la kristanoj, kies koroj deflankiĝas de Dio. „Estas tio ni, la malfeliĉuloj, kiuj nin mem dekristanigas,“ citas la kardinalo Sarah vortojn de Georges Bernanos, skribitajn antaŭ la dua mondmilito. La krizo de la eklezio en Okcidento havas komencon en forgesado pri Dio, li aldiras. „Se nia unua mezurilo ne estas Dio, ĉio komenciĝas kolapsi...“



### Flueca ateismo

„En mia lasta libro *Le soir approche et déjà le jour baisse (Estas preskaŭ vespere, kaj la tago jam malkreskas)* mi provis montri, ke la radikojn de ĉiuj nuntempaj krizoj ni povas trovi en flueca ateismo. Ĝi evidentiĝas tiel, ke la ekziston de Dio ni do ne neadas, sed praktike ni vivas tiel kvazaŭ Dio ne ekzistus.“ Tio estas veneno, kies viktimoj ni estas ĉiuj, diras la kardinalo Sarah. Ĝi enpenetras ĉion, ja eĉ en parolojn de klerikoj. „Ĝi konsistas en tio, ke kune kun la kredo ni allasadas radikale paganajn kaj mondecajn manierojn de la pensado kaj la vivo. Kaj ni kontentiĝas kun tiu ĉi nenatura kunvivado! Evidentiĝas tiel, ke nia kredo iĝis flueca kaj nekonsistenca! La unua reformo do devas okazi en niaj koroj. Ĝi konsistas en tio, ke ni ne plu koaliciiĝos kun mensogo. La kredo do estas ambaŭ: la trezoro, kiun ni volas gardi, kaj la forto, danke al kiu ni ĝin sukcesas gardi. „Forgesado pri Dio per la unua kaj plej grava maniero sin montras per sekulariga vivo de pastroj, direktas tion la kardinalo Sarah en proprajn vicojn. Se la persona vivo ne reflektas ilian taskon, kiu estas heroldado de la Ĝoja Mesaĝo, poste la praktika ateismo plu disvastiĝadas en la eklezio kaj la socio, li aldiras. Li ankaŭ ne tenas en sekreto konvinkon, ke ĝuste ĉi tie devas komenciĝi profunda kaj radikala reformo. „La eklezio estas sankta. Sed ni per niaj pekoj kaj la mondecaj interesoj malhelpas, ke ĝi ekbrilu en tiu sankteco.“ Sed al tio povas helpi neniu struktura reformo, aldiras kardinalo Sarah. „Mi estas konvinkita, ke la historion ŝanĝas sanktuloj. La strukturoj sekvas pli poste kaj ili enankras nur tion, kion la sanktuloj jam faris.“

### La civilizita homo estas heredanto

„Simile kiel en la romia regno de la 4-a jarcento ni spertas, kiel la povo aperas en la manoj de barbaroj. Sed tiam la barbaroj ne venas de esktere por invadi urbojn. La barbaroj estas interne. Estas ili tiuj unuopuloj, kiuj rifuzas sian homan naturecon, kiuj hontas, ke ili estas limigitaj kreitaĵoj, ili sin opinias esti demiurgoj sen patroj kaj sen

heredaĵoj. En tio troviĝas vera barbareco. Male la civilizito estas fiera kaj feliĉa pro tio, ke li estas heredanto. Ni konvinkigas niajn samtempulojn, ke libereco signifas esti de neniu dependa. Sed tio estas tragika eraro. La okcidentaj homoj estas konvinkitaj, ke ion akceptadi malakordas kun la homa digneco. Sed la civilizita homo estas per sia esenco heredanto: li ricevas historion, religion, lingvon, kulturon, nomon, familion."

Se ni rifuzas konekton al tiu ĉi reto de dependeco, la heredo kaj la fileco, ni elpelas nin al nura ĝangalo de konkura memsufiĉa ekonomio. Se la homo ne akceptas sin kiel heredanton, li sin kondamnas al infero de liberala tutmondiĝo, kie la individuaj interesoj konfrontas kun ununura leĝo de ajna profito.

Sed la kardinalo Sarah ne venas nur kun pesimisma analizo. La peton pri la lumo jam enhavas postulo de la disĉiploj irantaj al Emaŭzo, kiun li citas en titolo de sia libro: „Sinjoro, restu ĉe ni, ĉar estas preskaŭ vespero" (Luk 24,29). „Ni scias, ke Jesuo fine sin vidigos. Nia unua kaŭzo por espero estas do Dio mem," daŭrigas gvinea kardinalo kaj li memorigas promeson, ke pordegoj de Hades la eklezion ne superfortos. „Ĉiam en ĝi estos sufiĉe da lumo por tiuj, kiuj serĉas veron kun pura koro." Eĉ se do ŝajnas, ke ĉio direktiĝas al pereo, estas eble trovi brilantajn grajnojn de renaskiĝo. Estas ili ekzemple vivoj de la fidelaj geordenanoj, kiuj starigas Dion ĉiutage en la mezon de la vivo. Oazojn de la espero vidas la kardinalo Sarah en vivoveraj monaĥ(in)ejoj, en katolikaj familioj vivantaj la evangelion de la vivo, kiujn la mondo malestimas, sed ankaŭ en ekzemploj de multaj anonimaj sacerdotoj kaj kredantoj, por kiuj estas la ĉiutaga Eŭkaristio centro kaj senco de la vivo. „Ili portas la eklezion, eĉ se ili tion ne konsciiĝas," li aldiras.

### Pozitiva kontribuo kaj riskoj de la liturgia reformo

„En celebro de liturgio la eklezio revenas al siaj fontoj. La tuta kaŭzo de ĝia ekzisto estas la reveno al Dio, direktigo de la okuloj de ĉiuj al la kruco. Se ĝi tiel ne faras, ĝi starigas sin mem en la centron, ĝi fariĝas senbezona. Mi opinias, ke perdo de orientiĝo, la rigardo ne fiksita al kruco, simbolas bazon de krizo de la eklezio," diras kardinalo Sarah flanken de kritikoj de la liturgiaj reformoj. Ĉe tio, kiel li memorigas, la koncilio instruas, ke la liturgio estas „antaŭĉio honorigo de la Dia majesto" *(komp. Sacrosanctum concilium 33)*. Ni ĝin ofte platigis al nura homa memcentreca soleno. Dubigi ni do ne devas koncilion, sed ideologion, kiu en sekvaj jardekoj disvastiĝis en paroĥoj, diocezoj kaj seminarioj. Tial li avertas antaŭ trivialigo de la sakrala spaco kaj per vortoj de Romano Guardini li atentigas, ke la Dian proksimecon kaj la fidon je Li devas ekvilibri konscio de la Dia Majesto kaj timosento antaŭ lia sankteco.

Aliflanke la kardinalo Sarah respektas grandan diversecon de la bibliaj tekstoj por meditado kaj enkondukoj en la Sanktan Skribon en multaj lingvoj. La strebado pri la pli profunda teologia partopreno de la kredantoj, kiun li opinias kiel la plej gravan konsistan parton de instruo de la koncilio, laŭ li ofte restas nekomprenita. Anstataŭ pli profunda enkondukado de la kredantoj en paskan misteron, deglitiĝas tio al disdonado de roloj kaj funkcioj, al aktivismo. „Kaj fine, la liturgio estas verko de Kristo, ne estas do necese, ke la celebranto aldonadu siajn proprajn komentariojn. Ne temas pri la enkonduko de multaj novaj formuloj kaj aranĝaĵoj, la senĉesaj ŝanĝoj de la preĝoj, eĉ ne pri la vigleca liturgia kreiveco. La centro de la liturgio estas *metanoia,* radikala ŝanĝo de niaj vivoj kaj agadoj, grave malpurigitaj per peko kaj markitaj per flueca ateismo."

### La celibato kaj „frenezo de la kruco"

La celo de la sinodo pri Amazonio estas evangelizado de tiu ĉi regiono. Ĝi estas la regiona sinodo, kaj tial dum ĝi ne eblas pritrakti la demandojn, kiuj koncernas la tutan eklezion, kiel estas ĉesigo de celibato, daŭrigas prefekto de la Kongregacio por liturgio

kaj sakramentoj en respondo al diskuto okupanta la ekleziajn kuloarojn. Ne tutajn du semajnojn antaŭ komenco de la sinodo li esprimis antaŭtimon, ke ĝin al si alproprigos la okcidentaj reprezentantoj, kiuj volas validigi siajn proprajn projektojn. „Al iuj ŝajnas, ke ili estas ĉiopovaj, ĉar ili financas la malriĉajn ekleziojn. Ilia povo kaj ilia mono ne povas timigi nin,“ emfazis la afrika kardinalo. Li ankaŭ memorigis, ke la papo Francisko ne konsentas pri ĉesigo de la celibato. Li pri tio klare parolis dum preskonferenco post la reveno el Panamo. Li tiam citis la vortojn de la papo Paŭlo la Sesa, kiu diris, ke li pli volonte oferus sian vivon ol ŝanĝi la leĝon rilate la celibaton. Laŭ la kardinalo Sarah pri ĉesigo de la celibato strebas riĉa okcidento. La celibato do estas kruco de Kristo, enskribita en la vivon de la sacerdoto. Kaj la nuntempa mondo ne toleras rigardon al „frenezeco de la kruco“. La prefekto de la Kongregacio por liturgio rimarkis, ke ankaŭ li mem devenas el juna eklezio, mem li travivis evangelizadon, kaj tial li povas atesti, ke la junaj eklezioj ne bezonas edziĝintajn sacerdotojn, sed la sacerdotojn vivantajn en celibato kaj prezentantajn la vivan ateston de la kruco. ■

*Vatican News, 24.09.2019*

## Kardinalo Ouellet: EŬROPO, KIO OKAZAS AL VI?



Ĉe rigardo al situacio en eŭropaj landoj la katolikoj el aliaj kontinentoj ofte demandas: „Kio okazas al vi, Eŭropo?“ Tiu ĉi demando rilatas diversajn sferojn de: kulturo, publika vivo, klerigado, familio kaj infanoj, profesioj – atentigis kardinalo Marc Ouellet dum renkontiĝo de la eŭropaj episkopoj en Santiago de Compostela. La prefekto de la Kongregacio por episkopoj, kiu mem devenas el Kanado, rimarkis, ke la nuntempa krizo maltrankviligas ankaŭ la papon Franciskon. Li opinias ĝin tre grava, ĉar ĝi minacas transdonadon de la kristana kulturo.

La kardinalo Ouellet instigis la eŭropajn episkopojn al profunda analizo de ŝanĝoj, kiujn la malnova kontinento trapasas. Helpi en tio povas verkoj de la gravaj kristanaj verkistoj, kiel Henri De Lubac, Romano Guardini, Rémi Brague, Robert Spaemann aŭ Roger Scruton, al kiuj direktigis atenton de la episkopoj la vatikana kardinalo. Kun referenco al prelego de Benedikto la 16-a en universitato de Regensburgo li emfazis, ke la renkonto de la biblia mesaĝo kun la greka pensado kaj sekve ankaŭ kun la heredo de la romia civilizacio ne estis verko de hazardo, sed de la Dia Providenco, kiu plu restadas fundamento de Eŭropo.

Dum serĉado de la kaŭzoj de la nuntempa krizo la kardinalo Ouellet sin referencis al rimarkoj de la kardinalo Newman, kiu jam en la 19-a jarcento perceptis programan sekularigon, elpremadon de religio el spaco de la publika vivo, kulturo kaj scienco, sub preteksto de mondkoncepta neŭtraleco. Kiam post pli ol cent jaroj Benedikto la 16-a en Regensburgo enpensiĝis pri la sekvoj de tiu ĉi sekularigo, li devis konstati, ke la racio rezignis pri sia grandeco kaj iĝis nekapabla por dialogo de kulturoj. Pri la nova engrefto de la evangelio en eŭropajn fundamentojn hodiaŭ klopodas la papo Francisko kaj li tion faras antaŭ ĉio pere de regenero de la katolika sociala instruo, diris la prefekto de la Kongregacio por episkopoj dum la renkonto de la Konsilio de la Komisiono de la eŭropaj episkoparoj en Santiago de Compostela. ■

La 4-an de oktobro 2019

# LAŬ LA SPUROJ DE LA PAPO MONTINI – LA PAPO PAŬLO LA SESA

La 33-a kongreso de UECI (L'Unione Esperantista Cattolica Italiana – de la italaj katolikaj esperantistoj) ĉi-jare okazis en la urbo Brescia inter la 10-a kaj la 13-a de septembro. La kongresejo mem estis la spirita centro Mater Divinae Gratiae (Patrino de la Dia Graco).

La ĉefa temo de la kongreso estis „La lokoj de la papo Montini", kaj oni havis eblon viziti la urbon laŭ liaj spuroj.

La meson ĉe la Sanktejo de S. Maria delle Grazie, kie la papo Paŭlo la Sesa celebris sian unuan meson (1920) ĉefcelebris sac. Pierluigi Svaldi kaj kuncelebris sac. Nello Marcuzzi. En tiu sanktejo oni gardas la relikvon de la sanktulo. La preĝejo estis konsekrita antaŭ 480 jaroj (1539).

## LA PREĜO AL SANKTA PAŬLO LA SESA

Ho Sankta Paŭlo la Sesa,
filo de nia tero,
disĉiplo de Kristo en la fido,
paŝtisto de la Eklezio,
sankta antaŭ Dio kaj la homoj,
ni alvokas kun ĝojo vian protekton.
Vi, nun en la plena lumo de Dio,
daŭrigu propeti por la Eklezio en ĝia misio.
Havigu al ni, ankoraŭ pilgrimantoj,
la gracojn necesajn por sekvi Jesuon Kriston,
ununuran Savanton de la mondo.



*La italaj katolikaj esperantistoj kongresis en la urbo Brescia*



*La preĝon en la katedralo de Brescia apud la altaro de la sankta papo Paŭlo la Sesa tie preĝis la kongresanoj*

Post la meso ankaŭ okazis vizito de la fama preĝejo de la sankta Francisko de Asizo, apud kiu troviĝas la monaĥejo de la



*Concesio - la naskiĝĉambro de Paŭlo la 6-a*

konventualaj franciskanoj fondita en la jaro 1254 (la franciskanoj mem en Brescia ĉeestas ekde la jaro 1220). En la preĝejo troviĝas la tombo de la Diservanto sac. Giacomo Bulgaro (1879-1967). Oni ankaŭ vizitis la urbajn vidindaĵojn, i.a. la Kapitolon konstruitan 73 jarojn antaŭ Kristo kaj restaĵojn de la romia teatro (3-1-a jarcento antaŭ Kristo).



*En Santa Maria della Carita e del Buon pastore*

La trian kongresan tagon oni vizitis la urbocentrajn preĝejojn. Interalie malnovan katedralon (11-a jc.) kaj la novan katedralon, kie ĉe la impona monumento dediĉita al la sankta Paŭlo la 6-a oni preĝis la preĝon, kiun okaze de la kongreso esperantigis D-ro Antonio De Salvo.

Posttagmezon oni pasigis en Concesio, la naskiĝloko de la papo Paŭlo la 6-a, kiu situas ne tro for de Brescia. Nome, la familio Montini vivis en Brescia, kaj en Concesio vivis lia avino, en kies domo li naskiĝis. Nun tie troviĝas muzeo, kaj apude sur la bieno, kiun donacis la familianoj, estas la impona muzeo kun la modernaj artverkoj „Kolekto Paŭlo la 6-a“. Ege estis kortuŝa vizito al la naskiĝdomo, kie oni povis aŭdi multon pri la vivo de la sanktulo. Fine, en la „naskiĝĉambro“ apud la lito, kie li naskiĝis, oni preĝis kune Patro nia-n.

Dum la kongreso ankaŭ okazis la jarasembleo de UECI, renkontiĝo kun la lokaj esperantistoj kaj diskuto pri la estonteco de UECI kaj IKUE kun Marija Belošević, prezidantino de IKUE. ■

*Marija Belošević*
*ankaŭ aŭtorino de fotoj*



*Promeno tra la urbo Brescia*

## VAŜINGTONO, USONO – La Usona Konferenco de la Katolikaj Episkopoj traktis la temon de pornografio dum la vintra sesio (de la 16-a al la 19-a de novembro 2015) de la konferenco en Baltimore

"Produkti aŭ uzi pornografion estas morta peko, kiu bezonas esti konfesita, por ke la homo ricevu la Dian pardonon," diras la unua versio de dokumento "Kreu en mi puran koron: paŝtista respondo al pornografio." "La produktantoj kaj distribuantoj de pornografio damaĝas la komunan bonon kuraĝigante aŭ eĉ kaŭzante la pekon de aliaj homoj," ĝi diras.



*La episkopo Richard J. Malone el Buffalo, Nov-Jorko, parolas dum konferenco al ĵurnalistoj en la 16-a de novembro 2015 dum la ĝenerala vintra asembleo de la Usona Katolika Konferenco de Episkopoj en Baltimore. Episkopo Malone ĉefis en la komitato, kiu skribis la unuan version de "Kreu en mi puran koron," la episkopa dokumento pri pornografio. (CNS foto/Bob Roller)*

La proponita teksto, preparita de la episkopara Komitato pri laikoj, geedzoj, familia vivo kaj junularo, asertas, ke "multaj estas la viktimoj de la pornografio. […] Ĉia infana pornografio aŭtomate estas malhonesta komercado kaj krimo, ĉar ĝi koncernas la seksan ekspluatadon de etuloj por komercaj profitoj kaj ĝi perfortas la volon de la infano pro ties malkapablo konsenti."

La teksto rimarkas, ke "multaj homoj luktas kontraŭ uzado de pornografio, inkludе katolikajn fidelulojn, kredantojn, nekredantojn, edz(in)ojn kaj fraŭl(in)ojn, patr(in)ojn, (mal)junulojn, sacerdotojn kaj homojn en konsekrita vivo."

La Episkopo Thomas J. Olmsted enkondukis la temon de pornografio pli frue en tiu ĉi jaro, kiam lia apostola admon-letero, "Plenigi la malplenaĵon", publikiĝis.

"Pornografio ne nur lasas viron al danĝero de infero, sed ankaŭ detruas liajn ligojn kun lia edzino, detruo nome adulto," li diris en la dokumento. "Alivorte, oni komprenu pornografion kiel aferon egale seriozan kaj ne malpli probleman ol adulto. La provo ami iun kaj samtempe engaĝi sin en tiu praktika narcismo certe alportos gravan damaĝon."

La episkopoj aprobis la dokumenton en la 17-a de novembro (230 favoraj, 4 kontraŭaj, 1 ne balotis). Ĝi bezonis 181 balotojn por esti aprobita.

Antaŭ la balotado la episkopoj aprobis voĉe amendon proponitan de episkopo John F. Doerfler el Marquette, Michigan: "Tio estas grava afero pro ties objekto. Tio estas morta peko se oni faras tion kun plena kono kaj libera konsento. Senintenca ignoreco kaj faktoroj, kiuj damaĝas la aspekton voleman kaj liberan de tiu ago, povas redukti la moralan kapablon de la homo."

La amendo korektis la originan frazon: "Tio estas grava peko pro ties objekto, malgraŭ la partikulara intenco kaj la cirkonstancoj helpas determini kulpecon de la homo."

Prezentante la dokumenton al la episkopoj en la 16-a de novembro, la unua tago de ilia ĉiujara vintra renkontiĝo en Baltimore, la episkopo Richard J. Malone el Buffalo, Nov-Jorko, ĉefo de la komitato, kiu preparis la tekston, priskribis pornografion kiel "malhelan ombron en nia nuntempa mondo."

Li diris, ke ĝi estas "aparte sinistra speco de konsumado", per kiu viroj, virinoj kaj infanoj "estas konsumataj por la plezuro de aliaj homoj."

La episkopo Malone rimarkis, ke la do-

kumento, kiun oni prilaboris dum 3 jaroj, estas "envolvema en siaj celoj", sed ĝi neniel povas tuŝi la tutan aferon. Tamen, li diris, ĝin oni devas vidi pli bone kiel "impulsigilo" por promocii pliajn diskutadojn kaj materialojn por helpi homojn damaĝitajn de pornografio.

Li diris, ke la papo Francisko urĝis la usonajn episkopojn serĉi kaj kuraci la vundojn, kaj la dokumento pri pornografio donas ilojn por fari tion.

Uzante la pentofaran Psalmon 51 en la titolo kaj kiel konstanta moto tra la proponita dokumento, ĝi diras enkonduke, ke "ni vidas la korodeman damaĝon kaŭzitan de pornografio: infanoj kies senkulpeco estas ŝtelita; viroj kaj virinoj, kiuj sentas grandan kulpon kaj bedaŭron pro spektado foja aŭ kutima; edzinoj, kiuj sentas sin perfiditaj kaj lezitaj; kaj viroj, virinoj kaj infanoj ekspluatadaj de pornografia industrio."

Malgraŭ la usonaj tribunaloj havas malfacilaĵojn por difini pornografion, la proponita dokumento uzas la Katekismon de la Katolika Eklezio por difini ĝin: "kolekti realajn aŭ ŝajnigitajn seksajn agojn el la intimeco de homoj, celante montri ilin plenkonscie al aliaj homoj.'

"Ĝi envolvas tion, kio foje estas distingita kiel 'malpeza' kaj 'peza' pornografio," aldonas la proponita dokumento. "Tio estas falsa divido; ĉia pornografio estas damaĝema kaj peka, malgraŭ la efektoj en iu povas varii laŭ la intenso de la enhavo. Pornografio ne estas arto."

Ĝi diras, ke "pornografio neniam povas esti pravigita, eĉ inter geedzoj."

La proponita dokumento ankaŭ ligas pornografion al aliaj pekoj, "speciale masturbo. Masturbo, kiu estas plenkonscia erotika stimulado ĉe la loko de orgasmo, kutime okazas kune kun uzado de pornografio. Malgraŭ nia kulturo kutime komprenas ĝin kiel akcepteblan, masturbo estas ĉiam grave opozicia al ĉasteco kaj al digneco de homa korpo."

La teksto montras la difuziĝecon de pornografio: "Erotikaj, troseksigitaj kaj pornografiaj imagoj estas pli multe ĉeestantaj en nuna nord-amerika socio ol antaŭe. [...] La plejmulto da amuz-programoj fariĝis superseksigitaj. Noveloj, kiuj iam estus klasifikitaj kiel 'erotikaj', estas la plejmulto, sen kalkuli la novelan genron de romanoj malferme seksaj."

La proponita dokumento nomas pornografion kiel "peko-industrion." "Pornografio estas granda negoco. Oni kalkulas, ke la enkasigita mono atingas facile miliardojn da dolaroj ĉiujare. La pornografia industrio estas agresema, perceptema kaj nur sporade reguligita," ĝi tekstas. "Aliaj negocoj, kiel hotelaj retoj, kompanioj de kabla komunikado kaj kuracilejoj, multege profitas pro la difuzita uzado de pornografio kaj kontribuas al ties alirebleco."

Tia difuziĝeco kondukas al negativaj efektoj en homoj kaj en la socio, laŭ la proponita dokumento.

"Viroj estas speciale falemaj en pornografion ĉar la vira cerbo estas forte puŝita al seksaj imagoj, speco de 'vida magnetismo' agrese eluzita de la pornografia industrio," ĝi tekstas, aldonante, ke pornografio povas konduki al malvirto. Virinoj "uzas pornografion simile tial, kial viroj uzas ĝin," diras la teksto, kaj oni diras al ili la malveron, ke "uzi pornografion liberigas ilin."

"Spektado de pornografio, ofte kombinita kun masturbo, rekte afektas la rekompencajn vojojn de la cerbo kaj oni rimarkis, ke la spektado havas efekton en la cerbo simila al efekto de kokaino en homo droguzema aŭ de alkoholo en homo ebriema je alkoholo," ĝi diras. "La morala kulpeco de malvirta homo povas esti reduktita laŭ la cirkonstancoj, sed la situacio estas aparte serioza."

Pornografio atingas lerte la junulojn, kaj estas ĉefa faktoro de apero de "seksteksto" [sexting], tekstaj mesaĝoj sekse eksplicitaj "ligitaj al aliaj riskaj socialaj sintenoj," la proponita dokumento diras, inklude "la plej grandan riskon gravediĝi en adoleskanta

aĝo – aŭ gravedigante iun – aŭ ekhavi sekse transdonitan infekton”.

En unu sekcio el la 35-paĝa teksto, la uzantoj de pornografio estas urĝitaj formovi sin malproksimen de ĝi kaj remeti siajn vivojn je la manoj de Kristo.

Al la produktantoj de pornografio, la proponita dokumento diras, “La Sinjoro, en lia grandega mizerikordo kaj justeco, vokas vin formovi vin el viaj pekoj kaj sekvi Lin,” kaj aldonas, ke “se vi ankaŭ estas – aŭ iam estis – engaĝita en krima ekspluatado, ni urĝas vin raporti vian agon kaj lasi sin je la manoj de civilaj aŭtoritatuloj. Dio povas uzi viajn antaŭajn erarojn por helpi aliajn homojn.”

La teksto diras al viroj kaj virinoj uzantaj pornografion, ke ili “serĉu pardonon. Multaj bonaj homoj luktas kontraŭ tiu peko. Vi ne estas solaj; ĉiam ekzistas espero! […] Liberiĝo el pornografio estas ĉiutaga elekto kaj postulas konstantan edukadon.”

La proponita dokumento admonas la homojn damaĝitajn de la uzado de pornografio de sia edz(in)o, por ke ili “serĉu rifuĝejon en preĝado, en ricevado de sakramentoj, kaj en adorado al Eŭkaristio.” Dum “furiozeco je via edz(in)o estas natura kaj ofte justa,” la teksto sugestas, ke oni “starigu klarajn limojn laŭeble, ekzemple instalante interretan kontrol-programon, forigante ajn pornografion el la hejmo, zorgante sian propran sanon, kaj rifuzante esti uzita kiel kaŭzo de la uzado de pornografio far via edz(in)o.”

La teksto informas, ke paĝo de la retejo de la Usona Katolika Konferenco de Episkopoj, www.usccb.org, inkludos ĝisdatigitajn materialojn, inkluzive liston de subtenaj grupoj al tiuj, kiuj luktas kontraŭ la malvirto uzi pornografion, didaktikajn materialojn pri ĝiaj damaĝaj efektoj, kaj gvidon al familioj kaj porinfanaj laboristoj por protekti junulojn kontraŭ pornografio.

La episkopoj aprobis la unuan version de la dokumento en la jaro 2013. ■

*Transprenita el retpaĝo de Vitor Luiz, Brazilo*
*http://vitorluiz.6te.net/?p=1041*

## LA FUNDAMENTAJ VEROJ

Dio ĉiun homon amas kaj havas por li bonan intencon.

Sed pro peko estas ĉiu de la bona Dio apartigita.

En Jesuo Kristo estas proponita savo kaj la nova kuniĝo kun Dio.

Tiu ĉi savo en Jesuo Kristo kaj la nova vivo el la Spirito estas proponita al ĉiu homo.

**1.** - estas nur unu Dio, la plej granda mistero, ĉiam pli granda kaj pli alia ol estas nia imago pri Li.

**2.** - Li estas la plej justa, Li kreis ĉion, ĉion Li tenas en estado kaj per sia providenco Li zorgas pri ĉio. Bonulojn Li rekompencas per eterna rekompenco, kaj malbonulojn Li punas per eterna puno, se ili ne pentas (pro siaj pekoj). Nur Li estas la plej supera Sinjoro, plej supera Bono kaj Amo. Li amas ĉiun kreitulon. Se Li punas aŭ allasas malbonon kaj suferon, tio do nur tial, ĉar ĉiun homon Li volas savi kaj savi kontraŭ infero (kontraŭ „malluma truo“, dirus astrofizikisto; ĉar la materia mondo, dumtempa kaj videbla al ni iamaniere bildigas mondon nematerian kaj spiritan, nevideblan kaj eternan. Tempeco estas rebrilo de la eterneco. Brilantaj steloj bildigas ĉielon kaj „malhela materio“ sen iu ajn lumo bildigas inferon). Neniu malbono evitos punon kaj neniu bono evitos rekompencon.

**3.** - ekzistas tri Diaj personoj: la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito.

**4.** - Dio la Filo iĝis homo, por nin per sia surkruca morto elaĉeti kaj poreterne savi.

**5.** - la homa animo estas nemortema.

**6.** - la graco de Dio estas por la savo nepre bezonata; ni povas ĝin akceptadi de Kristo pere de fido, pere de observado de la dekalogo, precipe de la ordono de la amo kaj la justeco, pere de bonfarado, fasto, preĝo kaj la sakramentoj de la Eklezio. ■

## PACA NOKT´, SANKTA NOKT´




2. Paca nokt‘, sankta nokt‘! Tra la land‘ vibras kant‘: «Ho paŝtistoj, mi diras al vi: Jen en stalo la beba Mesi‘, Li de l‘ mondo Savant‘, Li de l‘ mondo Savant‘.»

3. Paca nokt‘, sankta nokt‘! Tie ĉi Fil‘ de Di‘ donas amon el Dia kor‘. Por elsavo nun sonas la hor‘: Krist‘ naskiĝis por ni! Krist‘ naskiĝis por ni!

STILLE NACHT, HEILIGE NACHT • Unisono 18 • CG 98 • nGL 249 • EG 46 • EM 180 • LD 824 • NAK 26 • kp. GL 145 (T) • M (Stil¬le Nacht): Franz Xaver Gruber (1818) 1838 • germana T: Joseph Mohr (1818) 1838 • E: mozaiko, Kloster Kirchberg 1997 • 2001 en ADORU 213

